



CGC 00406504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SCS — Ed. Jockey Club, sala 103 (sede própria)

Telefone: (061) 226-1298

CEP 70.300 — Brasília

Distrito Federal

MARÇO 1982

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 68

BRAZILLO, LA UNUA EN LA MONDO

En duonpaĝa artikolo, la revuo Esperanto (marto 1982, n-ro 915) analizas la statistikon rilatan al UEA—membraro en 1981. Unuafoje en la tutmonda historio de E-Movado, ekstereŭropa lando — Brazilo — havas la plej grandan nombron de individuaj membroj aliĝintaj al Universala Esperanto-Asocio, en unu jaro. Jen la unuaj dek landoj klasifikitaj sub tia celo, em 1981.

1. Brazilo	639
2. Francio	582
3. FR Germanio	480
4. Svedio	445
5. Nederlando	418
6. Usono	408
7. Japanio	342
8. Britio	338
9. Italio	242
10. Finnlando	229

Pri la rekorda pozicio de Brazilo, la aŭtoro de tiu analiza komentario dubas, ĉu nia Lando sukcesos longe teni sian honorlokon, pro jenaj malfavoraj kaŭzoj: transpagaj problemoj (kiujn la 66a UK solvis en 1981) kaj "malunueco de la landa Movado en tiu lando, kiu permesas al si la lukson havi tri landajn organizaĵojn (Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Koooperativo de Esperantistoj — ambaŭ aliĝintaj al UEA — kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto)".

Ĉi-rilate, ni volas reliefigi, ke la ŝajna malunueco de la landa movado eble evidentiĝas nur, ke la kontinenta vasteco de

nia teritorio (pli ol 8,5 milionoj da kvadrataj kilometroj) iam postulis la aperon de novaj landaj E-institucioj por komplementi aŭ intensigi la tradician E-agadon, kaj por efiki en diversaj kampoj: kultura, eldona, parlamenta, naciregistra k.t.p. Al tiu ĉi rezonado ankaŭ kondukas nin la artikolo apertinta en la sama revuo Esperanto (n-ro 895, julio/aŭgusto 1980, paĝo 121), kiam tekstas: "Brazilaj movadaj organizaĵoj havas plurajn milojn da membroj. *Eble ne estas lukso havi tiel multajn asociojn tie.* Celi ke la movadanoj el Fortaleza (en la nordo) kaj Porto Alegre (en la sudo) *estu en la sama Esperanto-organizaĵo* similas al antendoj, ke unuiĝu Norvega Esperantista Ligo kaj Helena Esperanto-Asocio. Tiom da flughoroj estas inter Fortaleza kaj Porto Alegre."

Do, ni pretas kredi, ke la nombro de landaj E-organizaĵoj, en nia kazo, tute ne malhelpus la reatingon de sama rekordo ĉi-jare. Versajne alia faktoro ne menciita de la revuo estas tiucele la granda baro: la por nia lando tro altaj aliĝkotizoj validantaj por la kuranta jaro, kio jam meritigis oportunan raporton de BKE al la Centra Oficejo de UEA, en Roterdamo.

Malgraŭ ĉio, ni esperas, ke ĉiu samideano kaj E-organizaĵo de la nordo ĝis la sudo de nia teritorio streĉu siajn fortojn por ke BRAZILLO konservu sian honorlokon en la membrostatistiko de UEA en 1982.

C.A.S. da Cunha

UEA-JARKOTIZOJ 1982

Ekde januaro validas jenaj kotizoj (v. revuon Esperanto, februaro/82, paĝo 39).

MJ — Cr\$ 1.040,00

MA — Cr\$ 2.600,00

La nunajn kotizojn prefere oni pagu rekte al unu el la du naciaj UEA—perantoj en Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto, Praça da República 54 — 2º, BR 20211, kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Av. Treze de Maio 47, sobreloja 208, BR 20031.

BRAZILIA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto

Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal 31, Ap. 73, BR 11100 Santos-SP

Estraro

Prezidanto: Carlos A.S. da Cunha, Caixa Postal 13-2088, BR 70000 - Brasília-DF

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza
Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília-DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos -
SHIN QI 02 - Cj 08, Casa 15 BR 715000 - Brasília-DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama,
SQS 306-A-101, BR 70000 - Brasília-DF

Kulturaj Aferoj Walter A. Francini,
Rua Afonso Bandeira de Melo, 35,
Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Oficiala organo de Brazilia Konsilantaro de Esperanto

Aperas monate

Dissendo senpaga

Redaktoroj provizoraj: Carlos A. S. Cunha kaj Nelson P. de Souza
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

Nekrologo

D-RO ERNANI DIAS CORRÊA

Okdek-unu jaraĝa, forpasis la 13an de marto, en Porto Alegre-RS, la arkitekto Ernani Dias Corrêa, kiu ĉeestis en 1974 la unuan kunvenon, en Brazilio-DF, por la fondo de BKE.

Plurfaka profesiulo, samideano Ernani Corrêa plenumis intensajn okupojn en la vivo de Suda Rio-Grando: li verkis por revuoj, projektis kaj konstruis domojn, elstare partoprenis arkitekturajn ekspoziciojn ĉe artsalonoj kaj ankaŭ batalis favore al la profesiula reguligo. Li estis konsilanto de Regiona Konsilantaro pri Arkitekturo kaj Inĝenierarto, fondinto kaj unua prezidanto de Instituto de Arkitektoj de Brazilo, katedra profesoro kaj direktoro de Belarta Instituto (nuna Artlernejo de la Universitato) kaj ankaŭ de Fakultato de Arkitekturo de Porto Alegre.

Li kunaŭtoris kun Rui Bacelar la konatan "Gvidlibro de la Inĝenieroj", eldonejo Globo; li ankaŭ aŭtoris diversajn monografiojn kaj verkaĵojn rilatajn al arkitekturo, el kiuj pluraj estis publikigitaj en revuoj, kies senlaca kunlaboranto li fariĝis.

Li estis fak-delegito de UEA pri Arkitekturo kaj vicprezidanto de BKE. Dum pli ol 15 jaroj li prezidis la Esperanto-Societo'n de Porto Alegre kaj lastatempe ricevis la titolon Honora Prezidanto de tiu Societo pro siaj altvaloraj servoj. En paco ripozu lia animo!

Kara Leganto: Cr\$ 1.200,00 estas la kosto de BKE-jarkotizo 1982. Do, kion vi atendas por fariĝi nia individua membro?



TRA LA MONDO

NORVEGIO — La Reĝa Norvega Ministerio pri Eksteraj Rilatoj eldonis sub la titolo "Informoj" belegan presaĵon en tre bona papero, kun multaj fotoj. Ĝi estas disdonata senpage, pere de Norvega Esperantista Ligo (Olaf Schousv 18, Oslo).

OOMOTO — Famkonata en la mondo, tiu luksa revuo el Japanio (Kameoka, Kioto-hu, 621) raportas pri la 66a UK en ses paĝoj, kun lastaj vortoj de la verkinto: "Survoje hejmen post du monatoj en Brazilo, mi preĝis, ke nia vojaĝo al Brazilo servos kiel "ponto" inter Oriento kaj Sudo — ponto, kiu kondukos al daŭra internacia kultura interŝanĝo. Nome de nia grupo, mi esprimas korajn dankojn al ĉiuj, kiuj bonvenigis nin dum la kongreso kaj en diversaj urboj, kiujn ni vizitis". La revuo aperigas multajn legindajn materialojn, inter kiuj ni mencias la raporton pri "Preĝo por Paco" kaj la gravan artikolon pri lingvoscio de nia majstro, "Ĉu Zamenhof konis la estonan lingvon?".


KOREA ESPERANTO--ASOCIO — Tiu landa asocio (CPO Kesto 4258 — Seulo 100 — Korea Respubliko) sendis al ni sian oficialan organon "La Espero", treege alloga revuo kolorpresita, plena de fotoj kaj artikoloj literaturaj kaj pri la Movado. Ni dankas, kaj sciigas la redakcion, ke la revuo estas ĉiam bonvena.

SVEDA FALDFOLIO — Tre bela faldfolio estas disdonata senpage de Turisma Entreveno en Falkoping, Vastergotland, Svedio.

JAPANIO — Ĉiutaga Eklumigo (K. Matubara — Tenmori — Kamiŝidami — Morijama — Nagoja) senpage disdonas interesan broŝuron "Lumo el Oriento!", pri spirita vivo.

SOVETUNIO — Esperanto-Komisiono (Ahunbabaeva str. 1, Taŝkento, P-7000000 SU) eldonas ĉiumonatan 4-paĝan suplementon, kiun oni povas ricevi senpage.

KIU ESTAS UEA? — D-ro Renato Corsetti, estrarano pri planado de UEA, verkis tre kuraĝan artikolon pri la rilatoj inter Universala Esperanto-Ligo kaj ĝiaj landaj asocioj, per kiu li faligas multajn mitojn kaj antaŭjuĝojn pri kaj en UEA. Tiu artikolo estas en la paĝo 43, de la revuo Esperanto, n-ro 915, marto 1982. Gratulon D-ro Corsetti! La vero super ĉio estas la plej bona E-politiko por la tuta mondo.



CORONÁRIO

Editora Ltda.

S.I.G., Qd. 6, LOTES 2340/50 - TELS.: 223-3449 - 224-0188 - 225-8289 e 225-8334

IMPRIMIUI.

BRAZILAJ NOVAĴOJ

FEDERACIA DISTRIKTO

- La avangarda Projekto "Alvorada" (Associação Brasileira para a Era do Aquário) havas en sia programo la instruadon de Esperanto kiel bazon por la Nova Erao. Informojn oni petu al Poŝtkesto 04-2419, BR 70.000 Brasília.
- Okazos en la periodo de 29/julio ĝis 01/aŭgusto 1982 la IX Tutmonda Konferenco por la Homa Unuiĝo organizita de Augusta Grande Fraternidade Universal Linha Solar (Poŝtkesto 07-0381, BR 70.000 Brasília). La programo inkludas Esperanton, kaj oni jam sendis specialan inviton al BKE.
- En nacia parlamentejo, dum la tagoj 17/19 de marto okazis Simpozio Pietro Ubaldi, kiun partoprenis gravaj esperantistoj, inkluzive Prof. Paulo Vieira da Silva, jam tradukinta la verkon. La Granda Sintezo, de tiu itala-brazila pensulo.
- Kun plezuro ni registras kaj dankas la aliĝon al BKE de la jenaj individuaj membroj: Sírilo Silva, José Carlos G. Vieira, Antonio de Pádua Soares, D-ro Joaquim do Couto, Ricardo Luiz R. da Silva, Wilson Pereira Deslandes, Néilson Ribeiro, Salvador Raymundo, D-ro Hugo Fóscolo, D-ro Álvaro Rabêlo, Manoel Borges dos Santos, Lia Milhomem Moreno, Symilde Schenk Ledon, D-ro Jannes Markus Mabeoone, Arnon R.B. Vasconcelos, Patrick Petiot, Euclydes Geraldís de Carvalho, Hersila Valverde, D-ro Lauro Coutinho, Ludimar Azevedo da Silva e Eurípedes Martins de Araújo.
- Associação Brasileira de Esperanto inauguris elementan kaj daŭrigan kursojn gvidatajn de Neima Cardoso Adorno kaj Ingeniero Enivaldo Alves Silva, respektive.
- Laborgrupo Antaŭen lanĉis, en la satelita urbo Taguatinga, Unusemajnfina E-kurson, preparitan de nia vicprezidanto Nelson Pereira de Souza. Pri la okazintajo legu aliloke intervjumon fare de nia raportistino, fraŭlino Berenice K. Eliot.
- MOMENTON! Bulteno de BEJO (Caixa Postal 11-1110 — 70084 Brasília-DF), aperigas kompletan analizon de raportoj pri la 4^a BEJK okazinta en Natal-RN, de la 28^a ĝis la 31^a de januaro lasta. Plena je fotoj, la publikigaĵo estas alloga, bonstila, kaj la raporto meritas aplaŭdon pro kuraĝaj memkritikoj al kelkaj programeroj, kiuj ne realiĝis aŭ funkciis malkontentige.

BAHIA

- En Ilhéus, okazis la Unua Simpozio Framasona, kiam samideano Eléus L. de Sá bruegis por Esperanto. En la tiurilata broŝuro, li raportas pri la fonda Internacia Unio de Framasonoj Esperantistoj (Caixa Postal 3.881, BR 20.000 Rio de Janeiro-RJ).
- En Salvador, Esperanta Studgrupo Zamenhof, funkcia ĉe Spiritisma Federacio de Stato Bahia, preparas tezon prezentotan al la 8a Kongreso de Spiritismaj Ĵurnalistoj kaj Verkistoj, okazonta tie en aprilo.
- Associação Bahiana de Esperanto, de la ĉefurbo Salvador, raportas: 1) aktivis kiel instruistoj gesamideanoj Marcelo Rocha, Elisabeth Passos, Siquara da Rocha, Ruy G. Matos kaj

Elísia Martins; 2) la 15an de decembro lasta oni festis ĉe la busto de Zamenhof en Largo São Bento; 3) okazis gaja Kristnaska Noktomanĝo kun granda ĉeesto.

RIO GRANDE DO NORTE

- Associação Portuguesa de Esperanto, Natal, sendis gratulkarton al la novaj estraranoj de BKE, kiun ni kordankas.

RIO DE JANEIRO

- Niterói Esperanto-Klubo, de la urbo kun sama nomo, havas novan estraron por la jartrio 1982/4: Prezidanto, Joaquim do Couto; Sekretario, Balbina Ferreira; Kasisto, Emílio Ferreira; Propagando k Socia aferoj, Marlice Botelho Belleza kaj Direktoro pri Kursoj, José Pedro milagres. La reelektita prezidanto ĝentile sendis al ni enhavriĉan Raporton/81, kun detala, oportuna kaj bone ellaborita bilanco. Sekvinda ekzemplo!
- Samideano Hersila Valverde, delegito de BKE, gvidas elementan kurson ĉe "Casa da Difusão Messiânica", en Jacarepaguá.
- En Nova Friburgo, samideano G. Petiot kaj Associação Esperança Internacional vigle agadas por organizi karavanon al 67a UK, kaj oni ja atingis belajn konkretajn proponojn. Skribu al Poŝtkesto 96920, BR 28600 Nova Friburgo-RJ.

RIO GRANDE DO SUL

- Samideano George O. Vaske informas, ke la maŝtara fabriko MALWEE publikigis dupagajn tekstojn pri Esperanto en sia Notlibro por 1982, disdonata al vestajkomercistoj tra la tuta Brazilo.
- Sub gvidado de s-ano Dirceu Porciúncula, la Spirita Societo Kardecista de Rio Grande malfermis E-kurson, en la 6a de marto lasta.

SÃO PAULO

- La brazila Sekciestrino de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj), profesorino Elvira Fontes (Rua Faustolo 124, BR 05041 São Paulo-SP) enketas pri la kursoj okazintaj inter la 16a/novembro 1980 ĝis la 15a/novembro 1981. Esperantistoj instruistoj devas raportoj al ŝi kaj helpi la plifortigon de tiu movado en Brazilo.
- Respondekas pri la rubriko "Esperantismo" en A Gazeta Esportiva, nia samideano D-ro Eluizio Bueno Rodrigues, prezidanto de Sorokaba Esperanto-Klubo.
- Esperanto-Asocio de San-Paŭlo respondekas pri tri rubrikoj en san-paŭlaj gazetoj: du semajnaj (en Folha da Tarde, zorgata de Deodato de França Mello, unua sekretario de tiu E-asocio, kaj en Diário Popular, zorgata de Elvira Fontes) kaj unu Monata, en Folha Espírita, zorgata de D-ro Walter A. Francini, vicprezidanto de tiu asocio kaj direktoro pri kulturaj aferoj de BKE.
- La 29-an kaj 30-an de majo 1982 okazos en São José dos Campos la 8a SAN-PAULA ESPE-

RANTO-RENKONTIGO. La aliĝkoto kosta ĝis la 30a de aprilo la sumon de Cr\$ 500,00. Junuloj (ĝis tiuj 20-jaraj) pagas la duonon. Post tiu dato, la aliĝkoto altiĝas — Cr\$ 700,00. Estos senpaga loĝado por 50 esperantistoj. Rapiĉo, se vi ne volas loĝi sub la ponto...

● La Redakcio korektas antaŭan informon (Bulteno n-ro 67): la eldonejo kreita sub respondeco de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo nomiĝas "Amigos do Esperanto", kaj ne Klara Zilbernick.

● BRAZILA KATOLIKO (Caixa Postal 4421 — 01.000 São Paulo-SP) — Ĝis aperis la numero marto/82, riĉa je informoj kaj kliŝoj. Jarabono Kr. 500. Oni devas helpi la laboron de Pastro Urbais, kiu estas ankaŭ reprezentanto de "Espero Katolika" (jarabono Kr. 1.000).

GUTOJ GRAMATIKAJ ...

Denove ni malfermas la mondfaman gramatikon "La Tuta Esperanto", de Henrik Seppik (Literatura Mondo, Budapeŝto, 1938), por preni el ĝi la ĉi-subajn instruojn.

Ordonon kaj deziro

Ordonon, peton kaj deziron (imperativo-optativo) al dua persono oni esprimas kutime per "u"-verbo sen pronomo (subjekto): "Venu!", "Iru!", "Skribu, Teodoro!", "Lernu diligente, infanoj, kaj obeu al viaj gepatroj"! Sed por akcenti la personon oni ja povas ankaŭ uzi la pronomon: "Vi restu tie ĉi kaj mi iros serĉi ilin".

Por la ceteraj personoj (unua kaj tria) oni ĉiam devas uzi koncernan pronomon, ĉar alie ja temus pri la dua persono: "Ni legu!", "Kiel mi komprenu tion?", "Li faru, kion li volas", "Ŝi menaĉetu tion!", "Ili kinprenu ankaŭ siajn infanojn".

Ĉiam, kiam temas pri ordono, peto aŭ deziro, la verbo devas havi la finaĵon "u", ankaŭ en nereka parolo, ĉe kio validas la supra regulo, ke en nereka parolo la verbo (predikato) devas havi la saman formon kiel en rekta parolo: "Mi deziras, ke vi tagmanĝu (nek "os", nek "us" taŭgas, ĉar temas ja pri deziro!) kun mi". Rekta parolo: "Tagmanĝu kun mi"! Same restas, kiam la predikato de la ĉefa frazo havas iun alian tempon: "Mi deziris, ke vi tagmanĝu kun mi. Mi dezirus, ke vi tagmanĝu kun mi", k.t.p.

Pliaj ekzemploj: "La bibliotekisto petis, ke oni reportu ĉiujn librojn", "La

instruisto ordonis, ke la lernantoj starigu", "La gepatroj volas, ke ilia filo fariĝu elektristo", "Ŝi diris, ke oni plu ne parolu pri tio", "La kunveno esprimis la deziron, ke la estraro ellaboru detalan agadplanon por la venonta jaro".

Ankaŭ post "por ke" oni ĉiam uzas imperativon: "Li ŝlosis la biciklon, por ke oni ne ŝtelu ĝin", "Skribu tuj, por ke la letero alvenu ĝustatempe".

RIMARKO: Pro sia nacia lingvo kelkaj uzas infinitivon anstataŭ imperativo: "Silenti!", "Ne kraĉi sur la plankon"! Sed tio ne estas ĝusta, ĉar per infinitivo oni ne povas esprimi ordonon aŭ deziron. Do: "Silentu"! "Ne kraĉu sur la plankon"! k.t.p. Volante esti speciale ĝentila, oni uzas la vorton "bonvolu": "Bonvolu silenti!", "Bonvolu ne kraĉi sur la plankon!"

Adverbigo de la prepozicioj

La prepozicioj kiel helpvortoj ne povas esti uzataj menstare, sed nur kun substantivoj kaj kelkaj (anstataŭ, por, krom, sen) ankaŭ kum infinitivo. Volante Uzi iun prepozicion menstare, oni devas adverbigi ĝin, t.e. aldoni al ĝi la finaĵon "e":

Mia familio iras antaŭ mi = Mia familio iras antaŭe (oni ne povas diri "Mia familio iras antaŭ"!); Ŝi ekrigardis malantaŭ sin = Ŝi ekrigardis malantaŭen. Unue ni trinkos kafon kaj poste (= post tio) ni ludos ŝakon. Mi venos baldaŭ; dum (= dum la atendado) vi povas rigardi la albumon. Mi ne havas tiom da mono kun (= kun mi). Pro manko de loko multe da homoj devis resti ekster (= ekster la domo). La banejo estas tute apud (= apud ni). Anstataŭ (= anstataŭ tio) mi iris hejmen. Krom (= krom tio) la libro estas ankaŭ instrua. Tute kontraŭ (= kontraŭ tio, male), li estas la plej bona homo, kiun mi konas. Ĉirkaŭ (= ĉirkaŭ ŝi) sur la planko kuŝas ludiloj. La urbocentro estas trans (= trans la rivero). Luktante la knaboj falis tiel, ke Karlo estis supre kaj Petro sub (= sub li). Mi sciigis pri la novaĵo per (= per mia amiko). Sur (= supre), ene (= interne) kaj ene (= kstere) estas uzataj tre malofte.

Monata Intervjuo

ESPERANTO BRUEGAS EN BRAZILIO GRAVA NOVAJO PRI INSTRUADO

La 14an de marto, kiam la Prezidanto vizitis kursfinon ĉe "Casa Transitória" en Taguatinga-DF, nia raportistino Berenice K. Eliot intervjuis nian Vic-Prezidanton, Nelson Pereira de Souza, kiu estas ankaŭ direktoro de Laborgrupo "Antaŭen":

BKE — Kion novan prezentas ĉi tiu kurso?

NPS — Post multjara instruado de Esperanto mi havis tre interesan kaj tute novan sperton, kiam L.A. lanĉis la metodon "Kursa Semajnfino".

BKE — Bone, sed kion signifas Kursa Semajnfino?

NPS — Laŭ la vortoj mem diras, ĝi estas kurso, kiun oni povas gvidi en unu sola semajnfino, t.e. en unu sabato kaj unu dimanĉo.

BKE — Ĉu vi estas kontenta pri la eksperimento?

NPS — Mi kredas, ke ne nur mi, sed ankaŭ nia Prezidanto kaj aliaj malnovaj esperantistoj ĉeestantaj la kursfinon konstatis hodiaŭ, ke homoj, kiuj antaŭ 48 horoj sciis absolute nion pri E., jam povis aŭskulti paroladetojn, kanti kaj eĉ diri salutojn kaj kelkajn frazojn en la I.L., kiel okazas ĝenerale ĉe aliaj kursfinoj.

BKE — Ĝi ja ŝajnas miraklo! Sed ĉu ĝi ne estas tro laciĝa?

NPS — Kredeble ne, ĉar ĝi estas seminaria sistemo tre uzata en alternejoj, armeaj kaj profesiaj kursoj tra la tuta mondo.

BKE — Kiom da homoj komencis kaj finis la kurson?

NPS — Komence estis 36 gelernantoj kaj en la fino... ĉiuj 36.

BKE — Ĉu oni postulas specialajn kondiĉojn por partopreno?


NPS — Tute ne. Estis heterogena kursanaro, kiel ordinare en E-kursoj. Partoprenis 1 kuracisto, 1 advokato, 2 militistoj kaj homoj kun mezgrada instruo (la plimulto gejunuloj 16–25 jaraĝaj).

BKE — Sed kiun metodon vi uzas?

NPS — Mi klarigu: temas pri sistemo alterne gramatika kaj parol (ig) a kun kantoj kaj informoj pri la Historio kaj la Movado laŭ la "Primeiro Manual" — tradukita "Premier Manuel" — eldonita de Brazila Spiritisma Federo. Entute estas 16 unuhoraj lecionoj kun 10-minuta paŭzo kaj 2 horoj por tagmanĝo; pli bone dirite: lecionoj de la 8^a ĝis la 12^a kaj de la 14^a ĝis la 18^a en du tagoj.

BKE — Gratulon, prof. Nelson, pro via revolucia kurso! Tamen, kion vi povas ankoraŭ aldoni?

NPS — La pagon (po Kr. 1.000) oni ricevas profite al Laborgrupo Antaŭen, kiu lanĉas la metodon kaj baldaŭ eldonos libreton kun detaloj. Al ĝi oni povas sribi petante informojn (Poŝtkesto 07-1055, 70000 Brasília-DF).



EL LA GAZETARO

● REALIDADE FANTÁSTICA (Av. Diógenes Ribeiro Lima 2.000 Bl. 34 Ap. 02, BR 05.458 São Paulo-SP), ĉiusemajne publikigas tutan paĝon kun E-kurso.

● OPÇÃO (EI Volta Redonda-RJ), aperigas rubrikon pri Esperanto gvidatan de la loka klubo, el kies laboro estas rimarkinda la sendo de letero al Ministério pri Klerigo, por enkonduko de E. en la lernejojn. Aliaj povas sekvi la ekzemplon, eĉ de eksterlando, skribante al: MEC — Ministério da Educação e Cultura — Programa de Expansão e Melhoria do Ensino-PREMEN, Av. Pasteur, 368 — BR 22290 Rio de Janeiro-RJ.

● ABELHA (a/c DCE—URG, Rua Gen. Vitorino 251, BR 96200 Rio Grande-RS), diskonigas en siaj paĝoj bonegan artikolon subskribitan de Roberto V. Rosa.

● ANUÁRIO ESPÍRITA (Caixa Postal 110, BR 13600 Araras-SP), raportas pri la 66a UK en 7 paĝoj verkita de s-ano Benedicto Silva kaj prezentas 8-paĝan "Esperanto em Tópicos", kun tre varia informado.

● REVISTA INTERNACIONAL DE ESPIRITISMO (Caixa Postal 9, BR 15.990 Matão-SP), transskribas de Mundo Espírita gravan artikolon pri "Esperanto en la Disvastigado de Spiritismo".

● AGORA (Rio Grande-RS), aperigas tutpaĝan noton pri la UK en Brazilio, kun granda foto pri la inaŭgura solenaĵo kaj reliefigas la paroladon de Vicprezidento D-ro Aureliano Chaves.

● JORNAL DA CIDADE (Bauru-SP), ofte publikigas notojn pri Esperanto kaj la loka Movado.

● **DIÁRIO DA TARDE** (Ilhéus-BA), enhavas ĉiusemajnan rubrikon subskribitan de la tre laborema s-ano Eléus Leonardo de Sá.

● **TRABALHADOR** (Caixa Postal 15, BR 13.320 Salto-SP), regule informas pri E-movado.

● **DIÁRIO DE JACAREÍ** (Jacareí-SP), publikigis tre interesan artikolon sub la titolo "Esperanto e a Juventude Espírita Jacareiense".

● **A NOVA ERA** (Franca-SP), ofte aperigas notojn pri Internacia Lingvo kaj enlanda movado, fare de la senlaca kaj ĉiam juna Silva Velho.

● **RIO DE JANEIRO ESPÍRITA** (Rua dos Inválidos 182 — BR 20231 Rio de Janeiro-RJ) publikigis allogan artikolon, "O Fácil Esperanto".


● **O INFORMANTE** (Lajeado-RS) — En la rubriko "Coluna do Leitor" nia aktiva Delegito, D-ro Modesto Belmonte de Abreu, verkas pri Esperanto.

● **CORREIO FRATERN DO ABC** (Caixa Postal 58, BR 09.700 S. Bernardo do Campo-SP), ofte publikigas notojn pri Esperanto.

● **SUL DO ESTADO** (Caixa Postal 84303 — BR 27180 Volta Redonda-RJ), aperigas tre interesan raporton pri "Esperanto en Brazilo".

● **O ECO** (Rua Dr. Carrão, 691 — BR 14400 Franca-SP) tre simpatias al Esperanto kaj ofte informis pri la pasinta 66a UK (mankas al ni informoj pri la loka movado...).

ĈU VI KAPABLAS RIDI?



I

— Panjo, mi skribis mian unuan E-leteron. Tuj mi iros al la poŝtejo por forsendi ĝin.

— Kion vi parolas? Ekstere ventas kaj pluvegas terure. Bona dommastrino ne permesus eĉ al sia hundo forlasi la domon en tia aĉa vetero! Via patro iru por enpoŝtigi ĝin.

II

Unua amikino — Nu, Klara volas nun kolekti antikvaĵojn; mi volus scii, ĉu ŝi jam trovis ion.

Dua amikino — Unu ŝi havas certe: sian naskiĝateston.

III

En cirko, la bela leon-dresistino metas sukerpecon inter siajn dentojn kaj lasas ke grandega leono elprenu ĝin.

— Ho, ĉi tion ankaŭ mi povas fari, diras juna rigardanto.

— Pri tio mi dubas, respondas la dresistino.

— Kial ne? Eĉ pli lerte ol la leono.

IV

Aktualaj problemoj. Kosmonaŭto rakontas, kion li vidis sur malproksima, ĝis nun ne esplorita planedo:

— La homoj iel similas nin. Sed la virinoj havas la mamojn malantaŭe.

— Ja maloportune, por mamnutri.

— Eble, sed tre agrable por danci.

V

Juna viro sendas sian edzinon al kuracisto, por scii, ĉu ŝi estas graveda. Vespere li demandas ŝin:

— Nu, anĝelo mia, kion diris la kuracisto?

— Li simple gluis sur mian ventron malgrandan etiketon. Rigardu.

La perpleksa edzo rimarkas, ke la teksteto presita sur la etiketo estas nelegebla per nuda okulo. Li prenas lupeon kaj decifras: "Kiam vi povos legi tion sen lupeo, estos tempo por via edzino iri en akusejon".

Noto de la Redacio: I, el "Interligilo"; II kaj III, el "Esperanta Legolibro", de Elio Migliorini; IV kaj V, el "Kruko kaj Baniko el Bervalo", de Louis Beaucaire.

LA 66a UNIVERSALA KONGRESO EN KASEDOJ

La amplekseĝan kaj enhaviĉan programon de la 66a Universala Kongreso de Esperanto konsistigas preskaŭ 200 (ducent) eroj, kiuj interalie inkluzivis:

- 14 sciencajn prelegojn en la kadro de la "Internacia Kongresa Universitato" (IKU) fare de eminentaj esperantistaj sciencistoj;
- duopan sinprezentadon de la estraranoj de Universala Esperanto-Asocio per klarigo de la funkciado de la Asocio kaj respondo al demandoj de la ĉeestantaro;
- TEJO-debaton kun raporto de juna brita esperantisto pri la Junulara Kongreso okazinta en Meksikio;
- kunvenon pri virina agado kun prelego de la akademiano William Auld rilate la temon "Kiel publike paroli";
- prelegon pri la agado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, gvidita de D-ro Humphrey Tonkin;
- prelegon pri la Internacia Jaro de la Handikapuloj, fare de D-ro Humphrey Tonkin;
- kunvenon de spiritistoj por lanĉo de la libroj: "De Francisko el Asizo por Vi" kaj "La Ĉielo kaj la Infero";

— Esperantologian Konferencon;

Tiu ĉi estas nur parto de la 37 prelegoj, kunvenoj kaj similaj eroj de la 66a UK registritaj en pli ol 60 kasedoj, kiujn vi povas akiri kiel lingvajn juvelojn kaj konkretajn memoraĵojn de tiu grandioza evento.

Depende de la daŭro de la programo, estis uzataj 1, 2 aŭ 3 kasedoj por ĝin registri.

Se vi, pro iu hazardo, bedaŭrinde ne povis ĉeesti la kongreson, jen bela oportuno havigi al si la eblecon ĝin "viziti" kaj preskaŭ partopreni en ĝi.

Ĉiu sonbendo kostas Cr\$ 600,00 plus la sendokostojn.

Se vi interesiĝas, tuj leteru al la ĉi-suba adreso por ricevi pli detalajn informojn kaj kompletan liston de la 37 programoj haveblaj en unuhora londaŭraj kasedoj.

Esperanto-Asocio de Brazilio
p/a D-ro Enivaldo Alves Silva
Caixa Postal, 04-0406
70312 Brasília, DF.

LETEROJ RICEVITAJ

* *Feliĉe, malgraŭ la defikito de la bulteno de BKE, oni ĝin povas ricevi akurate! La nunaj redaktoroj bonege daŭrigas la laboron gravan de Marija Almada (Elvira Fontes, São Paulo-SP).*

* *"La vero super ĉio" estas vere gratulinda ĉefartikolo de la Bulteno en nova fazo (Délio Pereira de Souza, Rio-RJ).*

* *Plezure mi ricevis vian sciigon pri kampanjo kiun la estraranoj entreprenas, precipe pri la subtenado de BKE. Kiel kunfondinto de tiu gravega kaj nova E-organizaĵo, mi neniamaniere*

rifuzus tian proponon (José Saraiva Matos, Salvador-BA)

* *Vi povas kalkuli sur mian plenan kunlaboron... ĉar vere BKE treege helpas nian Esperanto-Movadon kaj en Brazilo kaj en la mondo (Manoel Borges dos Santos, Salvador-BA)*

* *Mi deziras korespondi kun brazilaj ge-esperantistoj (Lech Romanek, ul. Siemianowicka 78, 41-503 CHORZÓW — POLLANDO).*

* *Bonvolu aboni por mi vian brazilan esperantistan bultenon kaj indiki al mi la prezon (Maurice Le Sage, 35133-Tougeres, Francujo).*

ATENÇÃO

Este aviso se destina a pessoas interessadas no estudo do Esperanto, mas residentes em cidades ainda não assistidas por professores do Idioma. Se você se enquadra nessa situação, sugerimos tomar curso por correspondência, que inúmeras entidades brasileiras propiciam a seus sócios, entre as quais podemos citar a LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(Praça da República 54, 2º andar, fone: 232-6309, CEP 20.211 — Rio de Janeiro-RJ) e a ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO (Rua Faustolo 124, fone: 62-1183, CEP 05.041, São Paulo-SP).

Os cursos e as anuidades sociais têm preços módicos. Confiram, pedindo informações por carta ou telefone.